EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IFEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 65> • Toskanio • AMO 95 •Senegalo • TEJO < novembro 25**

# Toskanaj tagoj

Gravitaj ondoj kaj regionaj rondoj estis entenataj en la frua festado de la Zamenhofa Tago en Pisa, Toskanio. Kulturaj programeroj okazis, kun koncerto de Piero Massim kaj Franco Meoli plus harpa koncerto kun kantvoĉo de Clarrisa Sabatini (sur la foto) en la sidejo de Edistudio, la organizinto de la tuta aranĝo.



Scienca programero kiu elstaris, estis vizito al la centro de la projekto VIRGO, kies Eŭropa kontribuo okazas en la regiono de Pisa, unu el nur tri tiaj centroj en la mondo (du el ili trovighas en Usono), La celo de tiuj centroj estas mezuri la ekstreman malforton de gravitaj ondoj, kies ekziston prognozis Einstein jam delonge, kune kun deklaro, ke neniu iam ajn povos mezuri ilin pro tiu malforto. La sciencistoj de VIRGO tamen montris, ke ja eblas mezuri ilin!

Kadre de la evento, la toskanoj organizis enlandajn ekzamenojn de la itala Eo Instituto laŭ la niveloj, A2 kaj B1.Ses kandidatoj prezentis sin.

Por la verkanto estis realigita vizito al la renoma muzeo kaj biblioteko en Massa, kiu disponas pri pluraj salonoj (tre plenaj!) kaj ĝuas ŝtatan protekton. Aliaj vizitoj estis al lernejoj, kie oni intencas ekinstrui Esperanton kadre de la projekto "Tridek oraj horoj".

Eksterlanda gasto imponiĝas pri la oftaj kaj por italoj esencaj haltoj por la etetaj tasoj sed gravegaj kafoj kaj la abundaj kaj bonaj manĝoj.

Sume pli ol 50 esperantistoj partoprenis en la toskana semajnfino. Konklude, la evento donis indikon pri sukcesa loka agado, kun efikoj tra pli vasta regiono.

# Italio denove agadas modele

"Ĝis nun ni ricevis 83 kontaktojn, el kiuj 51 enskribiĝis al la kurso. Kelkaj el la kontaktintoj estis iamaj lernintoj, kiuj petis informojn pri duagrada kurso. Ili estis

transdonitaj al Laura Brazzabeni, kiu aranĝas tian kurson. Ni havos 6 instruontojn por 8 kursoj [por havi malgrandajn lerno-grupojn]. La varba teksto estas ankoraŭ nesolvita problemo. La organizanto [G. Pfleger] pagis 50 eŭrojn por reta reklamado kaj ĝi estis afiŝita en proksimume 11 500 paĝojn. Oni ne scias pri la reklamado fare de la Itala Esperanto-Federacio.
Pasintjare estis 100 kontaktoj per 170 eŭroj kaj 63 kursanoj, el kiuj nur 45 serioze partoprenis. La sistemo funkcias, sed oni povas mastrumi ĝin pli bone.

Gianantonio Pfleger"

# AMO 95 pri vortara farado

Tiu AMO-sesio sukcese okazis kaj havis riĉan programon, kies rezulton ni alkroĉas. Jen pruvo pri la bona kunlaboro ene de la AMO-komisiono!

# Kurso prepare al la Afrika Kongreso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Esperanto-kurso en Senegalo
Gvidantonomo: Vjaĉeslav Slavik Ivanov
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Dakar, Senegalo (prepare al la 8a AKE)
Aldoninto: Slavik

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27474

# Kurso prepare al la UK 2024

En Tanzanio estas grupo de 20 personoj,kiuj lernas Esperanton per vacapo kaj mi estas la instruisto de tiu grupo. Do, en venonta tempo mi esploros eblecon komenci retkurson!

Mulele Mbassa Makaranga

# Brazila Kolekto produktas rezultojn

Ĉi-semajne aperis en niaj paĝoj traduko farita de **James Rezende Piton** el kanto de la fama brazila rokbando **Capital Inicial**, titolita *Forperditaĵo*; video de la katolika kanto *Amadi laŭ Jesua am'*, de **Pastro Zezinho**, registrita de **Flávio Fonseca**; kaj komponaĵo de **Vera Jordan**, el la KD *Esperanto, mia pasio*.

# Oficiala kurso en hispana mezlernejo

Ankaŭ en mezlernejo eblas lerni Esperanton. La gimnazio (IES) Almenara en la urbo Vélez-Málaga (proksima al Malago, en Andaluzio) proponas denove oficialan kurson pri Esperanto kaj Eŭropaj valoroj, danke al projekto "Esperanto-komuniko" kadre de la eŭropa programo Erasmus+. Ĝin kunordigas nia kolego Fabián Jiménez. Ĝi estas la sola hispana publika mezlernejo kie oni povas studi Esperanton kiel elekteblan lernofakon. En tiu ĉi jaro 29 lernantoj studos Esperanton en la 1a bakalaŭra kurso (estis preskaŭ 40 petoj por elekti tiun ĉi fakon sed kaŭze de organizproblemoj nur 29 povis fine studi ĝin). Ĝi

estos la dua fojo kiam oni instruos Esperanton oficiale; la unua fojo estis dum la kurso 2019-20 kiu bedaŭrinde ne povis esti tute plenumita pro la pandemia enfermiĝo.

## Eo-ĥoro en la Paca Tago

Kiel ni anoncis en pasinta Bitbulteno esperantista ĥoro, la Internacia Esperanto-Koruso, partoprenis en granda evento okaze de la 20a Internacia Tago pri Paco, la 17an de septembro 2022, en Toloso (Gipusko, Eŭskio, norda Hispanio), sub la gvido de Zdravka Bojoĉeva. Nia koruso enhavis dudekon da kantantoj el dekduo da landoj (Hispanio, Francio, Svislando, Luksemburgo, Danlando, Estonio, Pollando, Rumanio, Bulgario, Usono, Kanado kaj Kostariko). Partoprenis en la evento ankaŭ ĥoroj el Kolombio, Madrido, Eŭskio, kun junulara ĥoro.

Membro de la ĥoro, Linda Le Nepveu, franc-bulgara esperantisto, filino de Zdravka Boytcheva, partoprenis ankaŭ en la ronda tablo pri rilatoj inter arto kaj paco. Prezentinte Esperanton kiel universalan lingvon, ŝi aldonis, ke muziko estas eĉ pli universala ol Esperanto, kaj akcentis ke por daŭripova paco plej gravas edukado kaj konsciigo, ke ĉiu el ni havas ion por diri.

La tutan koncerton eblas spekti rete en: https://www.youtube.com/watch?v=7TXxnbrMTj8.

## TEJO aktiva pri scienco

TEJO, kunlabore kun ILEI kaj UEA, lanĉas novan konkurson por junaj esploristoj, sciencitistoj, kaj studentoj!. La Komisiono pri Edukado, Scienco, kaj Kulturo (ESK) de TEJO fiere prezentas sian novan konkurson ***KonSciU: Konkurso por junaj Sciencistoj kaj Universitatanoj***, kiu okazos la 27-an de novembro 2022 (dimanĉo), 14:00 UTC kadre de Retoso. ***KonSciU*** estas malfermita al **ĉiuj junaj sciencistoj, esploristoj, kaj studentoj** ekde la bakalaŭra ĝis la (post)doktora nivelo, kiuj estas samtempe individuaj membroj de TEJO. Prezentu vian esploron, montru viajn kreemon kaj komunikajn lertojn, kaj gajnu diplomon kaj aliajn premiojn!

**Kiuj estas la kondiĉoj por partopreni en la Konkurso?**

- Esti individua membro de TEJO kaj esti aliĝinta al Retoso 2022;
- Prezenti esploron, kiun vi mem realigis aŭ/kaj publikigis.

Ne necesas esti profesia sciencisto aŭ esploristo. Se vi estas studento aŭ laboristo en alia profesio sed fakas aŭ esploras pri iu fako, aliĝu kaj prezenti vian esploron!

**Kion mi devas fari?**

1. Preparu mallongan (3-minutan) prezenton pri via esploro. Plej gravos la voĉa komunikstilo kaj la enhavo de via parolado, sed ni ankaŭ rekomendas, ke vi preparu videblan prezentaĵon por akompani vian paroladon.
2. Trairi la **funelan sesion** en la 26-a de novembro (horo anoncota) kaj la **finalon**en la 27-a de novembro ekde 14:00 UTC, se vi estos elektita.

La gajnintoj ricevos diplomon kaj diversajn donacojn de TEJO, UEA, kaj ILEI. Krome, ili ankaŭ havos la ŝancon laŭelekte prelegi pri siaj esploroj dum la 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Lignano Sabbiadoro, Italio en aŭgusto 2023.

Se vi havas demandon, kontaktu Snehaja Venkatesh, la kunordiganton de ***KonSciU**,* ĉe <snehaja.esp@gmail.com> aŭ Telegrame @snehajaa.

## Du pliaj kursoj italaj – multegaj kursoj!

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza kurso
Gvidantonomo: Giuseppe Pascucci
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Romo, Italio
Aldoninto: gpascucci

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27477

Nomo: Duagrada kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Emanuele Bovio Regano
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Torino, Italio
Aldoninto: ema_rega

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27478

## Televide en Italio

Dankon al la itala nacia televido, kiu dissendis ĉi-matene filmon faritan okaze de la lasta itala kongreso de Esperanto, en kiu paco okupas la centran lokon, kaj gratulojn al la italaj agantoj por informado al neesperantistoj.

-

https://www.rai.it/dl/RaiTV/programmi/media/ContentItem-d381bc24-92a9-4ca2-b0ea-5a8415ef6712.html#p=

Vi ne bezonas kompreni la italan. mi resumis la ĉefan parton. la reston vi komprenos

========= vortoj: 1210 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.